Socikultura bulteno
de Fokolar-movado

Aŭgusto 2018

# 'Nova Urbo'

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

> ni Pontu <

GenFest estas la internacia renkontiĝo de junularo kiu volas montri, ke universala amikeco kaj unueca mondo estas tia Idealo, pro kiu valoras vivi kaj kunlabori. Dum lastaj jardekoj, GenFest fariĝis la granda festivalo de ideoj, konceptoj kaj agoj kiuj inspiris milojn da gejunulojn. Ĝi ŝanĝis ilian vivon, estontecon kaj rezulte – la mondon (eble ne la tutan, sed almenaŭ en kelkaj regionoj).

## GenFest – Pasu trans limoj!






Tiu ĉi lasta Junular-festivalo okazis 11a-foje kaj ĝia konciza nomo "GenFest" akceptiĝis jam daŭre. Gastigis ĝin la Filipina ĉefurbo Manila, al kiu venis ĉirkaŭ 6,000 junaj (18- ĝis 30-jaraj) entuziasmuloj el pli ol 100 landoj kaj, kio tre gravas, plejparte el Azio. Pluaj miloj partoprenis en aliaj 23 regionaj renkontiĝoj. La elektita ĉeftemo estis "**Vojoj /Padoj al Unuiĝanta Mondo**" kio signifas, ke ĉiu el ni povas kontribui al konstruado de amikecaj rilatoj en tiu konkreta medio, kiu nin ĉirkŭas. (..) Temas pri transiro super tiuj limoj, kiuj dividas ne nur la homaron socie aŭ politike sed – bedaŭrinde - ankaŭ en malpli grandaj komunumoj kiel laborlokoj, najbaraj domoj (stratoj, vilaĝoj) aŭ eĉ en familioj.

"Ni decidis organizi la ĉijaran GenFest en Azio, ĉar 60 % (elcentoj) de la monda junularo vivas en ĉi tiu grandega kontinento" – diris Kiara Lauren, membro de la JpUM /Y4UW (**Junularo por Unuiĝanta Mondo** / *Youth for a United World*.) kiu promocias kaj organizas la GenFest. "Malgraŭ la soci-ekonomiaj diferencoj kaj kaj problemoj kiujn alfrontas ĉi tiu grandega kontinento – la junaj generacioj parolas al la mondo pri espero kaj arda deziro por ŝanĝoj. Ni ne konsentas ke, je internacia skalo, oni oferu la tutaj popolojn por la avantaĝo de kelkaj elitoj. Ĉi tie ni invitas, ke ĉiuj rigardu trans siaj personaj, kulturaj, politikaj aŭ religiaj limoj por renkonti la aliajn, por ilin kompreni kaj faciligi la reciprokan riĉigon per ĉi tiu diverseco. Tio koncernas ne nur la individuajn partoprenantojn, sed ankaŭ niajn naciojn". La GenFesta programo inkluzivis 110 forumojn kaj metiejojn pri konstruado de malfermitaj kaj apogantaj sin reciproke socioj. Konkretaj projektoj por kunlaboro okazas interalie en:

- novaj metodoj de urbo-purigado kaj prizorgado ke tiuj teritorioj estu eble plej bonaj por siaj loĝantaro;
- diversaj formoj de sociaj entreprenoj;
- solvado de interpersonaj kaj politikaj konfliktoj;
- uzado de sociaj komunikiloj serve al paco.




Inter 28a de junio kaj 5a de aŭgusto, pli ol 400 gejunuloj partoprenis en la *Antaŭ-GenFesto* kaj volontulis en 20 diversaj lokoj de Sudorienta Azio. Tio estis interesa sperto renkontiĝi kun homoj de aliaj kulturoj kaj religioj, refaldi la manikojn kaj labori en marĝenigitaj socimedioj kiel orfodomoj aŭ malliberejoj. Kelkaj aktivis en kelkaj megapoloj urbegoj de Seulo kaj Honkongo sed ankaŭ en la periferiaj vilaĝoj Masbate kaj Pangasinan de Filipina Insularo. La junularo helpis rikolti rizon en la Vjetnama regiono de Hanoi kaj purigis la Filpinajn plaĝojn en la konata turista loko Palawan. La bona okazo estis partopreni senperan intereligian dialogon en Tajlanda urbo Chiang Mai, Indonezia Medan, Birma (Mjanmao) Yangon. En Coimbatore (Hindujo) ili renkontis multajn grupojn el diversaj socitavoloj kaj havis interesan sperton inter-religian. Ĉiuj rememoris tie la devizon de Mahatma Gandhi: "Estu mem tia ŝanĝo, kiun vi volas vidi en la aliaj".

---

## *Fortoj de la vivo*

### Espero

Mi neniam pensis ke niaj gapatroj povus disiĝi. Tamen tio okazis kaj nin alfrontis malcerta estonteco. Konfuzaj kaj malĝojaj pensoj min ĉirkaŭigis: fakte, nia vivo neniam estos jam la sama kiel antaŭe. Ni, la tri fratoj restis kun nia patrino, kiun ni nomis "Supera Panjo". Tamen la tuta vivo ŝanĝiĝis. Eĉ en lernejo ĉio estis facila sed nun ni komencis havi pli kaj pli da problemoj. Malgraŭ tio, ni volis pridonaci ŝin per ĝojo. Ni memoras, ke vivo kun nia Paĉjo ne estis facila, sed ni lernis de niaj geavoj neniam juĝi la gepatrojn. Kion fari? Ni komencis preĝi kune, ke Dio helpu ilin denove unuiĝi. (*J.P.L. - Kolombio*)

### Kuko

Unu el niaj najbaroj kontraŭstaris renovigon de nia malgranda domo, kvankam liaj protestoj ne estis justaj. Li sendadis al ni malĝentilajn leterojn kaj tiam mia edzo decidis kontaktiĝi kun juristoj por komenci la proceson en juĝejo. Ni interparolis pri tio kaj konsentis solvi la problemon tiel, kiel sufloris al ni la koroj. Anstataŭ akrigi la situacion, ni provu konstrui la najbaran "ponton". Mi bakis grandan kukon kaj sendis ĝin al tiu najbaro. Li demandis: "Kiel vi scias ke mia filino havas nun naskiĝfeston?" La supozita konflikto transformiĝis je agrabla renkontiĝo. Li vizitis nin kun sia familio kaj nun ni havas iom pli da amikoj. (*M. - Hispanio*)

### Ĝena lernanto

Antaŭ jaroj, al nia klaso aliĝis knabo tre malagrabla pro la familiaj komplikaĵoj. Kelkfoje li brutale eksplodis kaj gepatroj de la aliaj lernantoj protestis en la lernejestra oficejo. Tio signifis ke tiu knabo verŝajne estos forigita, kio certe ne helpos lin pliboniĝi. Mi alparolis la superulon, ke li permesu min persone prizorgi la knabon, se la ceteraj lernentoj helpos min. Samtempe unu amika familio kontaktiĝis kun la gepatroj de tiu knabo kaj la situacio komencis normaliĝi. Pasis longa tempo, mi revenis al tiu urbo kaj renkontis mian eksan arogantan lernanton. Li elkreskis jam, maturiĝis kaj estas fiera patro de sia familio. (*T.M. - Italio*)

# **La Torĉo**

Monda Pokalo  (parto 3)



Jen finiĝis la kelksemajna festo de ĉi tiu plej populara sporto.  La finalo (fina matĉo) de "Mundial-2018" okazis en la olimpika stadiono de Moskvo kaj samloke oni enmanigis la trofeojn.  Poste, en la stratoj, placoj kaj restoracioj - la sportistoj kun publiko dancis, kantis kaj ludis verŝajne ĝis la mateno.  Samtage kun la ferma ceremonio en Moskvo, en ĉiuj regionoj de Francio oni celebris la venkon de siaj futbalistoj.



Vespera vidaĵo de la olimpika Luĵniki-stadiono



La venka ĝojo eksplodis apud la pariza Eifel-turo.

Por proksimigi la etoson de tiu adiaŭa vespero, ni aldonas ĉi tie la popularan kanton "Apud-moskvaj vesperoj" /*Podmoskovnije vjeĉera*, kiu estas verŝajne tradukita ankaŭ al Esperanto – (4:40) https://www.youtube.com/watch?v=t5SlUmCdXf0 .

*" En la ĝardeno ne aŭdiĝas eĉ susuroj, ĉio eksilentis ĝis la mateno.*
*Ho, se vi scius kiel karaj por mi estas apudmoskvaj vesperoj..."*

Laŭ opinioj de eksterlandaj spektantoj, turistoj kaj de la sportistoj mem – la organizado de la 21a Futbala Mondĉampionado (konata kiel *Monda Pokalo* aŭ simple *Mundial*) estis tre bona. Tio ne estis facila, i.a. pro longaj distancoj inter la gastigantaj urboj.

La organizantoj de ĉijara "Monda Pokalo" (Mundial-2018) kaj la loĝantaro akceptis gastame ĉiujn eksterlandajn spektantojn. Dum la ĉampionado, la eksterlandaj gastoj povis amikiĝi kaj kun loĝantoj de ĉiuj lokoj, kiujn ili vizitis. En postaj komentoj, la turistoj substrekis amikecan atmosferon de ĉi tiu granda evento, kion ŝajnas konfirmi la fotoj de la spektantoj el**:**



Brazilo



Koreujo

(La ceterajn fotojn pri la spektantaro el ĉiuj kontinentoj vi povas vidi en galerio n-ro 3).

*

Ĉiuj eksterlandaj spektantoj estis akceptitaj tre gastame. Ili ne bezonis zorgi pri la vizoj por eniri la Rusan Federacion. Tiuj turistoj povis uzi senpage la publikan transporton en ĉiuj urboj kie okazis la turniro kaj ankaŭ por veturi inter inter tiuj urboj. Ili povis amikiĝi kun aliaj eksterlandaj gastoj kaj kun loĝantoj de tiuj lokoj, kiujn ili vizitis. Elrveturante, multaj decidis reveni tien por pli longa ekskurso.



Por helpi dum la Futbala Ĉampionado, kandidatiĝis 177 mil volontuloj. El tio, la FIFA-komisiono akceptis 35,000 personojn – ankaŭ de eksterlando. Tio estis ofte junaj homoj, kiuj estas iom engaĝitaj en sporto kaj kapablas komunikiĝi en kelkaj lingvoj.

Ili ricevis specialan trejnadon en 15 Volontulaj Centrejoj, lokitaj en universitatoj kaj en la gastigantaj urboj.



Apartan spacon de "La Torĉo" ni dediĉas al veraj herooj de futbalo – la goluloj (golej-gardistoj), kvankam ili ne estas tiel popularaj kiel la futbalistoj ludantaj fronte.

La ilustritan liston de la plej bonaj ni prezentas en galerio nr-ro 4.

(Daŭrigo en: www.familiaro.com )

# Nia Vilaĝo

*Homo kaj naturo*





Rikoltado de la kverkaj arboŝeloj

Utila plantaro:

## Korkokverko

Korkokverko (*Quercus suber* L,  el familio Fagacoj*)  estas arbospecio ĉiamverda, kiu kreskas abunde en okcidentaj regionoj de Mediteranea Maro (Pirenea Duoninsulo kaj Nordokcidenta Afriko).  Ĝi altas ĝis 20 metroj. En sia originala medio, tiu arbo disvastigas longe siajn branĉonj kaj tial ĝi ne atingas tiun altecon.  La malhele verdaj folioj de korkokverko estas 4-7 centimetrojn longaj. Ili estas malmolaj kaj haŭtecaj, ĉar kovras ilin  ĉar kovras ilin tia substanco, kiu protektas la troviĝantan en ili akvon kontraŭ troa elvaporiĝo.



La folioj restas sur la branĉoj tutjare
(ne forfalas antaŭ vintra sezono).





Kiel sugestas la nomo, oni utiligas ŝelon de tiu arbo en produktado de korko, uzatan ĉefe por ŝtopi vinbotelojn, sed ankaŭ en konstruado kaj dekoracioj.  Tiucele oni uzas nur la eksteran, sekiĝintan parton /epidermon de la arbo.  Tia arbo devas esti almenaŭ 25-jara kun 60-centrimetra perimetro de la trunko kaj 15 centimetrojn de ĉiu branĉego. Tial ekspluatado de la ŝelo ne damaĝas la arbon mem, ĉar ĉeloj de la ekstera ŝelo estas jam mortaj.  Tiel do arbo senigita je tiu seka parto povas kreski plu.  La "korkistoj" revenos al ĝi nur post ĉ. 10 jaroj, kiam la antaŭaj tranĉoj kunkreskiĝos.

Averaĝa korkokverko kresk 150- ĝis 250 jarojn kaj dum tiu periodo oni fortranĉas la eksteran ŝelon ĉirkaŭ 12-foje. Korkokverkaj arbaroj kovras spacon de 25,000 kvatrataj kilometroj, ĉefe en Portugalio, Hispanio kaj Tunezio.  Ĉirkaŭ 50 % de la monda kork-produktado okazas en Portugalio.

(Daŭrigo en:    www.familiaro.com )